

**Deklaro al la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj
Nacioj: 5-a Plenkunsido
(Kunordiga Segmento)**

31 januaro 2024

**Interveno de Profesoro Francis M. Hult
Universala Esperanto-Asocio**

Multlingveco estas kerna valoro de Unuiĝintaj Nacioj. Tamen ĝi malofte estas traktata rilate al la subceloj kaj indikiloj de la CDE.

Lastatempaj mejloŝtonoj atentigas pri la graveco de plurlingveco por CDE 1 kaj 16, precipe:

- La 30-a datreveno de la Deklaracio pri Minoritataj Rajtoj en 2022
- La lanĉo de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj ankaŭ en 2022 kaj renovigita atento al la Deklaracio pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (UNDRIP)
- La 75-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj en 2023

Ĉiuj tiuj instrumentoj havas komunan atenton al lingvaj rajtoj, inkluzive de nediskriminacio koncerne lingvojn.

La Deklaracio pri Minoritatoj kaj UNDRIP, siavice, diverse protektas la rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj indiĝenaj popoloj al siaj propraj lingvoj en medioj kiel edukado kaj amaskomunikado same kiel la rajton partopreni en ĉiuj sektoroj de la socio, inkluzive de decidada kaj politika procezoj.

Karaj amikoj, indiĝenoj kaj minoritatoj suferas misproporcie pro malriĉeco. Ni ne povas ignori lingvojn se ni volas lasi neniun malantaŭe. "Egala aliro al justeco por ĉiuj" ne realiĝos tiel longe kiel lingva diskriminacio daŭras, kaj "inkluziva, partoprena kaj reprezenta decidofarado" estas neebla se ĉiuj voĉoj ne estas aŭdeblaj.¹

La revizio de CDE 16 estas ŝanco por renovigita konversacio pri efektivigo de lingvaj rajtoj kaj novigaj multlingvaj solvoj al malriĉeco.

Video:

<https://webtv.un.org/en/asset/k1w/k1wm2nojdl?kulturaStartTime=3627>

¹ https://sdgs.un.org/goals/goal16#targets_and_indicators